

ESPERANTO

TRIUMFONTO



ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio).
W. M. Page, adv., Edinburgh.
E. Archdeacon, Paris.
Joan Gill North, Barcelona.
Teo Jung, Köln (Kolonjo).
G. van Heek, Hengelo.
Frans Schoofs, Antwerpen.
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno).
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Literaturredaktoro: Zanon.

ADMINISTREJO:
Köln-Horrem, Rejnlando.
Germanio.
Poŝtĉeka konto Köln 70863,
por Teo Jung Köln-Horrem.
Manuskriptojn oni skribu nur sur unu flanko de l' papero. Skribu ĉion legeble, se eble per maŝino. Por resendo aŭ respondo aldonu resp. -kup. aŭ poŝtmk. Adresu ĉion al s-o Teo Jung, Köln-Horrem, Germanio.

ABONEJOJ
ekzistas en multaj landoj. Vidu la liston de la Abonejoj sur la anonca paĝo. — En multaj lokoj ET estas poekzemplere aĉetebla ĉe stacidomoj kaj aliaj publikaj gazet- kaj libro-vendejoj kaj en grupoj. Dum vojaĝo oni postulu ET en ĉiu stacidoma gazet-vendejo, hotelo, kafejo kaj restoracio.
Komercaj ĉambroj favoraj al Esperanto abonas ET senpage ĉe la administradoj per oficiala letero. — Bibliotekoj, leĝejoj, redakcioj, aŭtoritatoj (ne-Esperantistaj) povas ricevi ET pro propagandaj celoj por la duono de la abonprezo.

Aperas semajne.
3 dolaroj, 7.50 guldenoj, 12 svedaj kronoj, 15 ŝilingoj, 15 danaj aŭ norveĝaj kronoj, 15 pesetoj, 25 francaj aŭ belgaj frankoj, 35 liroj, 60 flinaj markoj, 75 ĉsl. kronoj, 360 hung. kronoj, 1800 aŭstr. kronoj, 1600 pol. markoj. — Ĉiu pagas en la valuto de sia propra lando per naĉaj bankbiletoj en rekomendita letero, aŭ per germanaj bankbiletoj aŭ ĉekoj sur germanaj bankoj laŭ la taga kurzo. — Balkanaj kaj baltej ŝtatoj pagu duonjare 50 gmk., Rusio 40 gmk. Aliaj landoj pagu per dolaroj aŭ ŝilingoj, aŭ 100 respond-kuponoj aŭ 400 germanaj markoj. — Ne estas necese pagi tutan jarabonon je unu fojo. Oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. Abonantoj, kies abono estas finiĝinta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero. — Germanoj abonu ĉe la poŝto (Postzeitungsliste, 13. Nachtrag, Ergänzungsheft 3, paĝo 280, sub „Kunstsprachen“), kvaronlare 25.25 m.k., aŭ rekte ĉe la administrado Köln Horrem, Germanio (ĉiu numero banderolita 2.50 mk.).

ANONCOJ
kostas po cm² (kvadracentimetro) por ĉiuj landoj 3 gmk., ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj granda rabato. — ANONCETOJ kostas po 2 foja enpresoj kaj po 25 vortoj por bonvalutaj landoj (ankaŭ Italio kaj Finnlando) la prezon de 4 n-oj de ET (1/2 jar-abono aŭ 4 stampitaj respond-kuponoj); por malbonvalutaj landoj la prezon de 6 n-oj de ET (1/3 jar-abono); 1 foja enpresoj kostas la saman kiel 2 foja; ĉe rektaj abonantoj ni deprecas la pagon por anoncoj de la abonkonto. — Familiaj anoncoj (naskiĝo, fianĉiĝo ktp.) kaj anoncoj pri gravaj esp. okazontoj (ĉefkunido, fondiĝfesto ktp.) estas unufoje enpresataj senpage.

Numero 71 :-: Edinburgh, Paris, Barcelona, Köln, Hengelo, Antwerpen, Warszawa, Kaunas :-: 12. Febr. 1922.

Bildoj pri la urbo de nia Dekkvara.

Helsinki, la hela, la bela ĉefurbo de Finnlando.

La unuan fojon hodiaŭ ni povas prezenti al niaj legantoj kelkajn bildojn pri la urbo de nia nunjara Mondfesto: pri Helsinki, ĉefurbo de Finnlando, sidejo de nia XIV-a Universala Kongreso; ni esperas, ke en venontaj numeroj ni povos kompletigi la serion de tiuj bildoj.

Niajn finnlandajn legantojn ni tre petas, ke ili bonvolu sendi al ni artikolojn kaj rakontojn pri finna naturo, finna nacio, finnaj moroj ktp., tradukojn el finna literaturo, de finnaj legendoj, fabeloj kaj poemoj, „Leterojn el Finnlando“, aktualajn raportojn pri la Esp. movado en Finnlando ktp., por instigi kiel eble plej multe la intereson por la lando de nia venonta Mondfesto. Nian dankon ili havas jam antaŭe.

Kiel plibonigi la staton de nia movado?

S-o Sappl en ET n-o 69 estas tute prava. La laboro preskaŭ ĉiam surpelas la ŝultrojn de unu sola persono. La aliaj membroj ankaŭ estas kaptitaj de la „interna ideo“, ankaŭ pretaj por helpi, sed praktike ne estas kapablaj. Laboremaj, labor-volemaj, sed ne laborkapablaj. Tial ankaŭ la ĉiama sperto, ke la nombro de la homoj facile parolantaj la lingvon tute ne konformas al la nombro de la homoj lernintaj ĝin. La energio por ekzercado ne sufiĉas. Tial mankas la memkonfido, tial ili devas stari apude anstataŭ esti agemal helpantoj. Kaj tial oni devas serĉi iomete ankaŭ la kulpon ĉe niaj agemuloj. Ili havas kaj meritas la psikreskantajn anstataŭulojn, kiujn ili edukas. Eduku unue al parolkapableco! Oni ja scias, ke la ĝojo pri la ajn afero plialtiĝas kun la kreskanta povo. Ĉu tie ne estas peko de la estroj? Sed mi ja ne volas akuzi; mi nur volas provi, montri vojojn, krei povantojn. La laborvolo estas suzopata.
Homoj ŝatas la ŝanĝon. Ŝanĝo jam signifas ripozon, eĉ se ĝi ne havigas trankvilon, se nur



Panoramo de Helsinki, vidata de sudo.
En la mezo „Salutorget“ kaj „Senata Placo“, superstarata de l' preĝejo de S-ta Nikolao.

ŝanĝas la laboro. Tio estas la unua sekreto; la dua estas: Ĉiu ĉeestanto devas esti kunlaboranto.

Super ĉion mi skribas la postulon: Ĉiam laboru kun krajono kaj papero, precipe se vi estas komencanto! Se vi estas progresinto, eĉ ne eliru la hejmon sen krajono kaj notlibreto! Kaj eĉ majstro tralaboras verkon kun silpeto de papero apud la libro, por eliri novajn kaj dubajn vortojn.

Nun la ŝtupoj kondukantaj al la alto:
I. La unua ŝtupo konsistas en ekzercado de la frazoj bezonataj en la ĉiutaga vivo: Bonan tagon! Kiel vi fartas?, ktp. Ĉia respondo, forlasanta la kuitman vojon, donas novajn kaj plengigas la paperon. La paperon ne metu en ŝrankon, sed portu ĝin en la poŝto por ofia lega uzo.

II. Laŭ metodo Thora Goldschmidt, lertulo desegnas sur tabulo per kredo skizon, nenian arĵon — ĉia presita bildo povas servi, sed skizo bone povas limigi la komplekson; ekzemple (estas laŭtempa modelo) loĝkultrejo. 1. Komune oni gajnas la vortojn: bolas, kultras, kaldrono, kahelo ktp. 2. Laŭvice oni formas frazojn, kiuj enhavas ĉiun vorton. 3. Oni kolektas la frazojn, donante priskribon de la bildo. 4. Gravaĵo: Oni skribe redonas la priskribon, libere aligitan, ĝis sekvanta ekzercvespero. — Tiamaniere ĉiu ĉeestanto estas devigata spirite okupi sin pri ĉiu vorto kvarfoje. Eĉ se oni volus, oni jam ne povus forgesi ĝin. Tia speco de ekzercado precipe montras la valoron de la laboro kun krajono kaj papero.

III. Iu el la societo scilgigas nacilingve rakonteton. Sur komuna papero ĉiu skribas unu frazon,

kiu daŭrigas la rakonteton. Por lertuloj la estro formas la frazojn nacilingve iomete komplikitaj, kaj por komencantoj kaj nelertuloj ili formas ilin facilaj. Ĉiu povu kunlabori. Post finiĝo oni retraduku nacilingven, sed nature alvice. Devizo por skriba laboro: „Rerakontu!“, por la plenlertuloj eble en poema formo.

IV. Iu legu laŭte, malrapide kaj ekzakte el gazeto aŭ legolibro mallongan artikolon. Rerakontu 1. nacilingve, 2. Esperante. — Pli kaj pli grandigu la longecon de la legajo-partoj! La grado de la malfacileco ankaŭ estas diversa laŭ tio, ĉu la estro permesas al la anoj la kunlegadon aŭ ne; tial

V. Laŭta legado de rakonto el libro de unu kursano. Rerakontado de la partoj en Esperanto.
VI. Se laboras samkapablaj ekzercantoj, ili komune traduku donitan temon. Fiksu la novajn vortojn skribe kaj uzu ilin kelkfoje en frazoj. Laŭta legado estas necesa por atingi apud la korekta traduko ankaŭ bonsonon, kaj ĉar oni povas korekti la pekojn kontraŭ ĝi nur, aŭskultante ĝin.

VII. La plej alta ŝtupo, la krono. Libera parolado pri temo: 1. post kaj laŭ skriba preparo, sed parkere; 2. sen la ajn preparo. Kaj

VIII. Diskutado pri parolado. Diskutado pri la ajn temo el la ĉiutaga vivo, pri etika kaj aliaj demandoj.

Tiaspeca estro en unuigo kun regule venantaj membroj kreas la necesajn kunlaborantojn, ja „ŝiras la stelojn de la ĉielo“. Sed kie ekzistas la unua, mankas la aliaj. Al la „steloj“ ne minacas danĝero, kaj la entuziasmaj Esperantistoj devas plue batali sensubtene.

Geo Schmidt.

Io pri la Esperanta korespondado.

Jam delonge mi rimarkis, ke Esp. korespondemuloj tre ofte sin okupas pri diversaj malgravaj aferoj, nome, pri interŝanĝo de poŝkartoj, poŝ-

Kio do okazis? vi diros. Mortis soldato, simpla homo, unu el milionoj. Kio okazis? Unu homo malpli estos nun en la grandega oceano de la homaj vivoj. Ĉu tio estas grava?

Pripensu! Estingiĝis juna vivo. Ĝi havis ĉion: korpon, pensojn, dezirojn, amon, esperon — kaj subite nenio restis! Kaj anstataŭ tio beleco de vivanta estaĵo restis senanima korpo! —

Brilas la suno. Printempa galeco plenigas la aeron. Ĉie movado, ĉie vivo. Kantetas la birdoj, krietas la infanoj, verdigas la arboj, disvolvigas la floroj. . . . Malrapide trapasas la straton funebra veturilo kun simpla ligna ĉerko. . . . Unu, nur unu sola homo sekvas ĝin. „Petro, kara mia amiko, al kiu estis bezona via morto? Al kiu? Al kiu?“

S-ino Nadejda Umanski.

Soneto.

De Heinrich Heine.

Melankolie dum vespera horo
Perditaj sonoj la animon skuas,
Kaj larmoj brule de la vangoj fluas,
Eligas sango el la vundita koro

Kaj kvazaŭ en la fundo de spegulo
La bildon vidas mi de l' amatino,
Ĉe tablo, kun laboro sur la sino,
Trankvilo ĉirkaŭ ŝi kaj en okulo

Sed leviginte ŝi subite kriis:
„Jen prenu!“ Kaj de l'kapo ŝi fortendis
Plej belan buklon, — mia koro ondis

Mefloto pro la ĝojo min envilis;
Li ŝpinis ŝnuron el la belaj haroj
Kaj trenas min per ĝi de multaj haroj.

Zanon.

Enkonduko.

Laŭ propono de mia amiko Teo Jung mi akceptis la oficon de literatura redaktoro por ET. Ĉi tion mi faris kun plezuro, unupartie pro simpla helpemo, ĉar la portemaj ŝultroj de nia ĉefredaktoro jam estas troŝarĝitaj, kaj aliparte pro natura inklino, ĉar la Esperanta literaturo estas mia specialaĵo.

Plene mi konscias la prirespondecon, kiun mi prenis sur min; ĝi estas triobla: 1. koncerne ET mem; 2. koncerne la legantojn kaj 3. koncerne la kunlaborantojn.

Jurnalo, kia nun estas ET, devas distingiĝi per modela, interesa, multflanka fako literaturo. La legajoj devas sin adapti al la gusto de ĉiuj nacioj. Pro tio stila modeleco per si mem ne sufiĉas; la ĉefafero estas la enhavo. Ĉi tiu pritraktu la plej diversajn temojn. Mi do aperigos ne nur beletristikajn artikolojn, poeziajn, aforismojn ktp., sed ankaŭ disertaciojn pri artaj kaj sciencaj aferoj. Ankaŭ vivoplenaj, karakterizaj priskriboj (ne tro longaj) el ĉiuj partoj de la terĝlobo interesos la legantojn. Ĉiokaze mi preferos originalajn skribaĵojn.

Ĉi ĉion atentu la kunlaborantoj, al kiuj mi promesas plenan senpartiecon kaj objektivon. Neniu sin sentu ofendita, se foje lia manuskripto ne estos presata. Faciligu al mi la laboron, ŝatataj kunlaborantoj, sendante nur bonajn kaj ankaŭ tre legeblajn manuskriptojn. Tiuokaze ni laboros harmonie por la utilo de ET, de niaj legantoj kaj de nia bela lingvo.

Zanon.

Petro.

Li estis rusa soldato. Plenviva, kun larĝaj ŝultroj, gaja, bonkora rusa mallertulo. Li soldatiĝis en la tempo, kiam la deviga militservo daŭris

ses jarojn. Maldolĉe ploris lia maljuna patrino, kiam Petro foriris.

„Ne ploru, patrino, ne estas nun milito; do ne estas danĝero por mi. Se mi kondutos bone, post dujara militservo mi ricevos libertempon kaj revenos al vi, al nia kamparo, al mia ĉevalo „Vasko“. Ne ploru! Du jaroj ja ne estas eterneco.“

Sed kiam eksilentiĝis la bruo de la veturilo forportanta Petron, longe ankoraŭ ploris lia patrino, longe. . . Fontoj da larmoj fluas el ŝiaj okuloj, kaj ŝi ripetadis: Ĉu mi revidos Petron?

Pasis unu jaro. Dum tiu tempo Petro sendis tri leterojn, skribitajn per la helpo de lerta kamarado M., kun sia apenaŭ legebla subskribo. Li sendis multajn salutojn al la patrino, al kamaradoj, kaj ne forgesis eĉ Vaskon, sian ŝatatan amikon. Nenion li sciigis pri si mem. Zorgo pri la patrino, pri la kamplaboro — tio estis precipe la enhavo de ĉiuj leteroj de Petro.

Pasis plia jaro. Du leteroj alvenis de Petro. En unu el ili li informis la patrino, ke li suferas pro febro kaj ke li tusas. Tiun malsanon li kaptis dum la ekzercado, kiuj postulis longan restadon en subteraj tranĉeoj. Sed li trankviligis la patrino, dirante, ke en la milithospitalo li estas bone flegata kaj ke baldaŭ li revenos hejmen.

Estis la unuaj tagoj de marto, kiam Petro, vojaĝante al sia kamparo, haliis por ripozi en la urbo T. Frumatene li ekfarpis la pordon de M., estinta kamarado, kiu finis sian militservon antaŭ nelonge.

„Ĉu vi, Petro? Vi havas libertempon, ĉu ne?“ demandis M.

„Jes, mi havas. . . eble por ĉiam. Ĉu en tia stato mi kapablas esti soldato? Mi ĉiam febras, ŝvitas. Oni ne plu bezonas min. Malsana kaj senforta mi estas.“

kaj sigelmorkoj kaj aliaj similaj (pardonu!) bagatelaj. — Mi prenis unu el la lastaj numeroj de ET, trarigardis ĝian fakon de „Korespondo kaj Interŝanĝo“ kaj venis al jena konkludo: Proksimume 86% de ĉiuj korespondemuloj sin okupas pri la „interŝanĝo“ kaj nur 14% deziras korespondi pri temoj seriozaj, nome, pri pedagogio, filozofio, psikologio, tekniko ktp. El tio rezultas, ke ni, Esperantistoj, kapablas interesigi nur pri malgrava aferoj.

Efektive, ofte oni aŭdas la plendojn de seriozaj samideanoj, ke nia korespondado konsistas nur el la interŝanĝo de diversaj bagatelaj objektoj, pri kiuj mi jam antaŭe parolis. — Eble, iu diros, ke ne ĉiuj esperantistoj estas sufiĉe kleraj por korespondi pri seriozaj temoj. Certe, tio ĉi estas vera. Sed ne forgesu, ke per interŝanĝado de poŝtkartoj kaj poŝtmorkoj oni ne povas perfektigi en Esperanto. Krom tio, ĉiuj similaj korespondemuloj malŝparas ne nur la karan tempon, sed ankaŭ la monon, per kiu ili povus subteni nian Esp. gazetojn.

Nenian perfektigon iu akiras per la interŝanĝo de poŝtkartoj, sur kiuj (tre ofte malkorekte!) estas skribite: vian poŝtkarton mi ricevis, aŭ: sendu al mi poŝtkarton de via urbo, aŭ: sendu poŝtmorkojn de via lando ktp.

Novaj samideanoj, havu iom da pacienca, el-lernu antaŭ ĉio pli malpli perfekte nian karan lingvon kaj nur post tio ĉi korespondu!

Se iu deziras perfektigi en Esperanto, li traduku malgrandajn artikolojn el sia nacia lingvo, sendu la tradukon al pli sperta samideano, kiu ĝin korektu kaj poste resendu. Mi estas certa, ke, agante tiamaniere, ĉiu akiras la sperton kaj scion. Kiel alin estu, ni montru al indiferentuloj, ke ni estas homoj seriozaj.

Nia Esp. mondo devas havi kiel eble plej multe da spertaj Esperantistoj; ĉar, se en iu loko estas unu aŭ du bonaj samideanoj, ĉu ili povas plenumi la tutan laboron? Certe, ne. Ne povas unu homo esti prezidanto de la societo, ĝia sekretario, gvidanto de pluraj kursoj ktp.

Tial, ne per poŝtkartoj ni lernu Esperanton! Ne malproksima estas tiu tempo, kiam la tuta mondo diros al ni: Donu la instruistojn de Esperanto!
V. Bormanis, Latvio.

Komerco.

Propono de la Asocio por komercaj kaj helplingvo tutmondaj en Vieno (Aŭstrio).

La disvastigo de Esperanto jam nun ne nur ebligas rektajn interrilatojn de komercistoj de ĉiuj landoj por scigi pri produktado kaj vendebleco, pri en- kaj eksporto de komercaĵoj, sed ankaŭ ebligas tre valorajn informojn pri komercaj rilatoj.

Se oni organizus tiujn ĉi eblojn, laŭ nia opinio jam nun oni povus efektivi la sekvantan programon, pri kiu ni petas malfermi diskutadon.

Ni proponas, ke en plejble ĉiuj landoj estu fondataj

Esperanto Komercal Societoj (E.K.S.) sub tiu ĉi aŭ simila firmo.

La taskoj kaj celoj de tiuj ĉi entreprenoj devus esti:


Perado de rektaj interrilatoj de landoj al landoj per ESPERANTO, en- kaj eksporto de komercaĵoj ĉiuspecaj kaj prizorgo de ĉiuj aferoj komercaj.

El tiu ĉi branĉigis jenaj fakoj:

1. Reprezentado de fremdlandaj firmoj, sen aŭ kun komisia vendado.
2. Enporto de komercaĵoj post fiksa aĉeto.
3. Ek-porto de komercaĵoj post fiksa vendo.
4. Perado, se eksterlanda firmo intencas inter-

rilatigon kun firmo de speciala branĉo aŭ se la dezirata reprezentado superus la proprajn fortojn.

5. Perado de en- kaj eksterlandaj kapitaloj, perado de kompanio je negocoj, perado de aĉeto de jam ekzistantaj aŭ fondo de novaj firmoj kaj okaze je komercaĵoj ĉiuspecaj.
6. Kvankam la nomo „ESPERANTO“ estas uzata en la firmitolo, ĉiuspecaj komercaj aferoj, se ankaŭ ne rilatantaj al Esperanto, povus esti perfektigitaj.
7. Ĉar tiaj Esperanto-entreprenejoj treege estus interesataj je la disvastigo de Esperanto, ili devus favori la klopodojn, kiuj celas ĉi tiun, ĉu per instruado, literaturo, propagando aŭ reklamo.
8. Konstantaj ekspozicioj de produktoj kaj notado de ofertoj de firmoj, kiuj akceptus la peradon de E. K. S., ne nur servus al E. K. S.-oj, sed ankaŭ certe helpus la disvastigon de Esperanto.



Bildoj pri Helsinko.

Supre: La Preĝejo de S-ta Nikolao super la Senata Placo, vidata de Sudo. Konstruita laŭ projektoj de J. L. Engels. Maldekstre: Antaŭhalo de la Nikolao-Preĝejo fronte al la Senata Placo, en la fundo dekstre la Senatejo. Vidata de Okcidento.

9. Komuna gazeto por la diversaj E. K. S.-oj certe multege povus servi al la tutmonda komercistaro.*)

Per vigla kaj konfidoplena kunlaboro de la diversaj E. K. S.-oj povus esti kreata tutmonda komerca organizo, kiel reto super la tuta terglobo, ebligante unu-sole per la lingvo Esperanto.

*) Vm. de Red.: Ni atentigas pri la fakto, ŝajne ne konata al multaj Esp. komercistoj, ke jam ekzistas bonega speciala Esp. gazeto por komercaj aferoj, la Internacia Komerc-Revuo (adreso: Zülich, S. 12., Hauptpostfach 6104). Ni rekomendas, ke ĉi tiu ĝis nun aperinta numeroj la artikolojn pri la organizo de la E.-p. komerca movado.

La Internacia Urbo.

La Unuiĝo de la Internaciaj Asocioj daŭrigas sian agadon por la starigo de Internacia Urbo,* kombinita kun la Universala Ekspozicio de Bruselo en 1930. Ĝi prezentis sian projekton al la diversaj ambasadoroj kaj regnaj senditoj. Kelkaj el ili akceptis kun interesiĝo la komunikon (Granda Britujo, Japanujo, Hispanujo, Rumanujo, Svislando, Ĉeĥoslovakujo, Argentino, Ĉilio, Persujo, Meksikujo).

En la Monda Palaco, la sidejo de la Unuiĝo, okazis speciala kunveno la 6-an de januaro, okazis speciala kunveno la 6-an de januaro, okazis speciala kunveno la 6-an de januaro.

*) Vidu ET n-ro 68!

mem jam en la unua tago: per § 11 de la Fund. Gram. (eĉ „gramatikaj finigoj estas rigardataj kiel memstaraj vortoj“), per ĝia tuta genia strukturo kaj per lia eksplacita deklaro.

2.

Iuj homoj trovas la elementoteorion (t. e. ĝian eksterajn) „tro matematika“. Sed kial ĝuste tro matematika? La logiko uzas tute la saman simbolon! Al la logiko la konsidermaniero de la elementoteorio estas adaptita; kaj devas esti adaptita. Ĉar la elementoteorio pritraktas ne la akustikan (fonetikan) kaj optikan (grafikan) formon de la lingvo sed la idean; kaj la kombino de ideoj instruas la logiko. Lingvoscienculoj scias, ke pli kaj pli foriĝas la voko de lingvo-flozofoj al la lingvo-esploristoj: Ne forgesu per la (forma) lingvistiko la idean flankon de la lingvo, instrumento de rezonado!

La elementoteorio per si mem kondukas nek al la opinio de la Idistoj, nek al nia, nek al tiu de s-o G.-M. Ĝi nur ebligas koncize formuli ilin kaj pruvi ne ilian „erarecon“ aŭ „ĝuston“, sed iliajn pli aŭ malpli grandajn praktikecon kaj akordon kun la nacilingvaj kutimoj. Kaj ĝia metodo resp. ĝia uzata de ni nomenklature eĉ perfekte taŭgas. Ĉar per ĝi oni povas pli nete kaj mallonge formuli la diversajn fenomenojn kaj opiniojn ol laŭ alia maniero.

La Idista doktrino instruas (laŭ tiu formulado): La interelementa rilato de finaĵoj estu aŭ ĉiam la sama aŭ ĉiam esprimita.“ Ekz. a) „homa“ nur = „stanta homo“, neniam = „de homo“ b) „hom-al-a“ ĉiam por „de homo“, Esperante „homa“, „kron-iz-ar“ ĉiam por Esperante „kron-i“, „marjel-ag-ar“ ĉiam por Esperante „marjel-i“. Tio estas nepraktika, ĉar ĝi malebligas elektit en

*) La rilato de la esprimita per ĝi ideo („agi“, „aĵo“ aŭ „de kvalito“) al tiu de la antaŭiranta vortelemento.

prezidita de Lia Moŝto D-ro Adatci, Ambasadoro de Japanujo.

Diskuinte la projekton, kiun prezentis kaj klarigis s-o Paul Orlet kaj senatano H. Lafontaine, la ĉeestantaj aŭ reprezentataj ambasadoroj kaj ministroj decidis havigi la proponon al siaj regnestroj.

La Komitato elektita de la Unuiĝo estos baldaŭ pligrandigata per aldono de naciaj sekcioj. La regnestroj estos invitataj por starigi tiujn sekciojn sub sia oficiala protektado, kaj kun la celo, plej atente pristudi la tutan demandon.

La komisionanoj alportos siajn konkludojn en konferencon, kiu okazas en Bruselo dum la monato junio 1922.

Lernejo.

En Béziers (Franc.)

f-ino Roksano malfermis la 4. febr. oficialan kurson en la porknabina perfektiga lernejo Barbeyrac. 38 lernantinoj partoprenas.

Arkitekturo.

Ekspozicio pri moderna domkonstruado en Torino, Italio.

En Torino okazos dum aprilo-majo 1922 samtempe kun kongreso de italaj inĝenieroj tre grava kaj interesa ekspozicio pri moderna domkonstruado, organizita de la loka Inĝeniera Asocio.

La ekspozicio internacia estos dividata en klasoj: konstrua materialoj (kalkoj, ŝtonoj, metaloj, lignoj ktp.), pruvmaŝinoj, maŝinoj ĉiuspecaj aplikataj al la domkonstruado, konstrua sistemoj kaj ilia praktika aplikado, ekonomaj domoj kaj dometoj, kamparaj domoj, mebloj, specimenoj, modeloj, projektoj ktp., eldonaĵoj, ĵurnaloj, teknikaj revuoj, libroj ktp. Partoprenontoj ĝuas fervoiajn kaj transportajn rabatojn. Firmoj aŭ personoj dezirantaj partopreni la ekspozicion, turnu sin Esperantlingve al inĝ. M. de Balzac, Via Parini 10, Torino, Italio, komitatano.

Fervojo.

En Torino (Italio)

Esperanta Fervojista Unuiĝo, post parolado de s-o Broglio, delegito de F. E. I., kaj s-o Bissetti, konsilanto de E. F. U., fondis novan Maŝinistan Grupon kun ĉ. 50 personoj. Unua elementa kurso jam komenciĝis.

Donacoj.

Por „Esperanta Ligilo“

alvenis ankoraŭ kelkaj donacoj:

185. Esp. Grupo Freital 25 gmk. — 186. Esp. Grupo Trautenau, Ĉeĥoslovakio (kolekto dum paroladvespero en „Reichshof“ la 28. Jan.) 330 gmk. — 187-188. (Per „Germana Esperantisto“) L. Altman, Tallinn, Estonio 50 gmk. kaj Max Büschel, Leipzig-Stötterij 6 gmk.

Por malsatantaj rusoj

alvenis pluaj donacoj: Ed. Bellion, Montreux, (kolekto farita okaze de grupfesteto) 10 sviz. fk., M. A. C. Schaafsma, Beverwyk 10 fl., Jos. Kothe, Oppeln 3 gmk.

Poŝto.

Nia Budapeŝta korespondanto komunikas al ni, ke la ĵurnalo „Szozat“ en sia numero de 20 jan. aperigis sciigon, laŭ kiu unu membro de la Internacia Poŝta Unuiĝo alvokis la ŝtatojn, ĉu la enkonduko de Esperanto estas ebla en la telegrafan servon. Dek estis por, dektri kontraŭ la enkonduko.

Internacia Presa kaj Eldona Societo.

Ni ŝuldas al niaj legantoj ankoraŭ klarigon pri la stato de la projektita Internacia Presa kaj Eldona Societo. La preparoj sukcesis bone, kaj la signita kapitalo jam atingis 220 000 gmk. Sed la subita kaj neatendita aliĝo de ĉiuj prezoj decidigis nin, provizore ne fondi la Societon laŭ granda mezuro. Estos nuntempe nur fondata Eldona Kompanio aparte de la eldonejo de ET kaj sen propra presejo, kaj la alia projektita Internacia Presa kaj Eldona Societo estos fondata nur poste laŭ granda mezuro kaj kun alta kapitalo, kiam ambaŭ entreprenoj: ET kaj la Eldona Kompanio, staros sur nepre firma negoca bazo, tiel ke kunigo de ambaŭ entreprenoj je unu sola granda Presa kaj Eldona Societo jam anticipe garantios bonan sukceson. Al tiuj samideanoj, kiuj promesis aĉeti akciojn de la fondota Societo, ni dankas kore kaj petas ilin, ĉe la efektiva fondo de la Internacia Presejo-Eldonejo denove anonci sian partoprenon.

La unua frazo kaj la dua ĝis la punktokomo estas konformaj ankaŭ al mia opinio. Sed nun mi faras la demandon: Ĉu ne ekzistas analogioj (precedencoj) por la signifiĝo de adjektivo-verboj, kaj kion ili eble instruas? Kaj ni konstatas, ke ĉe miloj da adjektivoj la ideo „igi... a“ estas unuverte esprimita kun kaj ne sen „-ig-“; plue, ke en la tuta Esperanto estas nur unu escepto en tiu rilato (kaj ankaŭ nur laŭ la kutimo de kelkaj, ne de ĉiuj Esperantistoj!): „absrakt-i“ = „igi abstrakta“. Oni — t. e. la tuta Esperantistaro — diras „liber-igi“ kaj ne „liber-i“ por „igi libera“, „glat-igi“ kaj ne „glat-i“; por „igi glata“, „neces-igi“ kaj ne „neces-i“ ktp.; se la verba formo de adjektivo estas uzata sen „-ig-“, ĝi estas uzata en la senco „esti... a“ (tiel okazis ekz. pri „grav-i“, „prav-i“, „neces-i“, „fier-i“). Konsiderante tion mi konkludas, ke la oportuno de la lingvo ne malprofitas sed profitas, se por „igi abstrakta“ oni diras „absraktigi“ kaj ne „absrakti“. Ĉar neniu tiam bezonas konservi en la memoro, ke inter miloj da analogiaj interelementaj rilatoj ĉe adjektivo-verboj estas unu sola neanalogia, escepta. La eventuala superajo pledanta por s-o G.-M. estas, ke dirante la pli oftajn ideojn „igi abstrakta“ oni ŝparus unu silabon; sed por „esti abstrakta“ (anstataŭ „absrakti“) oni devas aldoni eĉ du pliajn: la eventuala gajno vere ne egalvaloras la allason de ununura escepto. *)

*) Ĉe Grabowski informo, estas vere, en versoj oni trovas „liber-i“, „glat-i“ en tiu senco, sed ili ne troviĝas imitatojn.

*) Se estas granda nombro de adjektivo-verboj analogi al „absrakti“, aŭ se Esperanto ankoraŭ ne estas vivanta lingvo kun siaj legoj, la afero estas alia. Oni devus tiam esplori, ĉu la poka fliko de la rezultanta signifo de adjektivo-verboj eble estus pli oportuna; sed oni venas al la rezultato, ke la nuna solvo estas la pli praktika.

La Elemento-Teorio,

lingvo-filozofia metodo kaj ne konkludo.

De Eugen Wüster.

(Dim. de Red. Ni disponigas hodiaŭ lastafajle liron por lingvosciencal detaligo. La antaŭajn artikolojn de s-o Wüster multaj ne komprenis laŭ ilia efektiva senco. Eble la nuna artikolo iom pli kompreniga la antaŭajn artikolojn kaj entute la lingvosciencal metodon de la aŭtoro. Sed, opiniante, ke ET estas precipe praktika ĵurnalo, kiu uzas nian lingvon, ni estonte ne plu publikigos trosciencajn prilingvajn artikolojn.)

En n-ro 65 de ET s-o Grosjean-Maupin aperigis artikolon, en kiu li turnis sin t. a. kontraŭ lingvosciencia metodo de li nomita „matematika“. Estas evidente, ke li celas la elementoteorion, kies principojn mi skizis en ET 41/42 („Esperantologio kaj esperantologio“). Liaj detaligoj povas lasi erarigan memoron en leganto ne sufiĉe sperta pri la historio de la lingvosciencoj konstanta kaj sinteza; tial bezoniĝas kelkaj klarigaj aldonoj. *)

1.

La principo de la elementoteorio estas, ke ĝi atribuas al ĉiu vortelemento de plurelementa vorto unu signifon (la elementan ideon) kaj krome esploras la rilaton inter tiuj elementaj ideoj la interelementan rilaton). Ekz. ĉe „paperkorbo“ ĝi rigardas unue la du elementajn ideojn „papero“ kaj „korbo“ kaj due la interelementan rilaton „por“ (korbo por kaj ne ekz. el papero)

Tio estas procedo ne iniciatita de Couturat aŭ de Saussure, sen uzita ĉiam, de kiam oni okupis sin pri la lingvo: en la antikvaj tempoj kaj de internacie konataj modernaj lingvo-esploristoj; ankaŭ en la lingvosintezo jam antaŭ 300 jaroj. Por Esperanto ĝi estas adoptita de Zamenhof

*) Mi insiste rekomendas, ĉiam relegi la respektivan parton de la artikolo de s-o G.-M.



Al „Bildoj pri Helsinko“: La Universitato. Konstruita de J. L. Engel.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

En Verviers, Belgio

La Esp. movado kreskas bonege. Nun funkcias jenaj kursoj: en la grupejo 3 kursoj kun 9, 7 kaj 25 partoprenantoj (kvara kurso komenciĝis en lasta semajno), ĉe la kvara grado de la urba knabaj lernejoj 2 ĉiusemajnaj kursoj nedevigaj kun entute 80 lernantoj, ĉe Laborista Sindikato „La Lainière“ post parolado de s-o Pirnay la 5. febr. tuj komenciĝis kurso kun ĉ. 40 personoj (instruistoj pagataj). Aliaj kursoj baldaŭ funkcios ĉe la Ruĝa Kruco kaj la Sindikato de Komerc-Vojaĝistoj. Tiuj bonaj rezultatoj estas sekvo precipe de la regula ĉiusemajna enpresigo en lokajn tag-jurnalojn de informoj praktikaj pri Esperanto eliritaj el ET kaj „Esperanto“. Plej facila, plej efika propagando, nepre farinda de ĉiu grup-sekretario. — La 8. jan. la grupo aranĝis Esperanto-Tagon bone sukcesintan kun Esp. Ekspozicio, pri kiu la ĵurnalo „Le Jour“ aperigis detalan artikolon. (I. D.)

Sukcesa Kabaredo-Posttagmezo en Budapeŝto.

Sub la gvido de s-ano ĉefingenero Bela Szasz, honora prezidanto de la hungara Landa Esp. Societo, kelkaj junuloj aranĝis kabaredo- kaj posttagmezon en la Socia Muzeo la 29. jan. Je 5 h. la ĉambrego jam estis troplenigita. La kabaredo estis parte hungara, parte Esperanta kaj krom kelkaj numeroj tre bonhumora. La bonhumoro liveris la teatraĵetojn aktualaj kaj priesperantaj de s-anoj Szasz, Brody kaj Hevesi, kiujn bone sukcese ludis la tri Tomas, fratinoj, fraŭlinoj Szekely, Strasser kaj Spiro. Plej bone sukcesis karikaturo de komitatunsideo. Inter la seriozaj numeroj estas menciindaj la belaj Esperantlingvaj kantoj de s-ano Kethelyi kaj la numeroj de la ERA-membroj Sarossy, Baghy kaj Balkanyi. Post la prezentado, kiu daŭris preskaŭ tri horojn, sekvis danco, tombolo kaj senpaga teservado.

La 26. febr. estos granda kabaredo-vespero en la teatra ĉambrego de Memeszdomo (VI, Arena ut. 68), aranĝata de la grupo ERA sub la gvido de Julio Baghy, kun partopreno de Sarossy, s-ano Kethelyi kaj de la ERA-membroj. Alilandanoj kaj provinccanoj, kiuj venos dum tiuj tagoj al Budapeŝto, nepre ĉeestu! Post la prezentado danco, tombolo, aŭkcio, danckonkurso ktp.

4.

Kaj ankaŭ tiu ununura escepto kredible ne estiĝis pro motivoj, kiujn prezentas s-o G.-M., sed pro alia kaŭzo: La radikoj „abstrakt-“ ne pli frue ol per la I-a Aldono estis fiksat kiel adjektiva; en realo ĝi estis kaj estas „hibrida vortelemento“ (v. ET 55), t. e. ĝi estas por kelkaj aŭtoroj (ekz. Grabowski, v. lian grandan vortaron Esperantan-polan) primitiva verbo.

S-o G.-M. diras, ke l'o sama kiel pri „abstrakt-“ kaj „abstrakt-i“ okazas ankaŭ pri „korekta“ kaj „korekti“, „fiksa“ kaj „fiksi“, „konfuzo“ kaj „konfuzi“. Sed tio ne estas ĝusta. La radikoj de tiuj vortoj ne plu estas adjektivaj, ili estas tute nete fiksitaj kiel verboj: „korekt-“ kaj „konfuz-“ en la Fundamento, „fiks-“ en la I-a Aldono. Kio pri ili estas riproĉata, tio ne estas la i-formoj sen „-ig-“, sed ĝuste la verba fikso; ĉar tiu verba fikso ne lasas — ankaŭ laŭ 99%-aj analogioj de la interelementa rilato — apliki la kunmetaĵojn „korekt-a“, „fiks-a“, „konfuz-a“ en la bezonata internacia senco. Se kontraŭe la diritaj radikoj efektive estas adjektive fiksitaj, ĉio estus en ordo; ĉar tiam ĉiu havus la raiton regule formi la kunmetaĵojn „korekti-igi“, „fiksi-igi“, „konfuzi-igi“.

5.

Maksimuma taŭgeco de lingvo estas karakterizata de la ekvilibro inter la maksimumaj oportuno kaj precizo. Sed ĉio ĉi restas nur nuba frazaĵo sen adaptita metodo kaj sen kriterioj. Ke la elementoteorio liveras tiajn, eble serioza esploro jam povos konstati laŭ la ĝisnunaj specimenoj. Se ne, certe post kelkaj jaroj, kiam la Esperantistoj jam iomete konos tiun branĉon de la Esperantologio en ĝia tuta universala frukto-doneco; kiam oni ne plu juĝos ĝin nur laŭ la „matematika“ eksterajo. (31. 12. 22.)

Franclando.

La 3. febr. okazis la jara kunveno de la Pariza grupo. Post legado de la raporto, estis reelektataj en la grupon komitato la elirantaj membroj: Archdeacon, Cart, Dubois, f-ino Gérard kaj, anstataŭ s-ino Cense, s-o Delanoue, banka oficestro, antaŭe delegito de UEA en Nemours. — La 29. jan. okazis en la Centra Oficejo la jara kunveno de Parizaj membroj de UEA. Anstataŭ la ĉefdelegito s-o Camescasse, tre okupita, estis elektita unuvoĉe s-o Delanoue.

Esperanto ĉe polico kaj armeo.

S-ano Stefano Kethelyi en Budapeŝto ricevis oficialan permeson de la hungara ministristro kaj de la ministro por Internaj aferoj, por instrui Esperanton ĉe la policistaro de Budapeŝto kaj en oficiraj societoj.

En Biasca (Svis., Tiĉino)

estas fondita Esp. grupo „Ĉiam Antaŭen“.

En Horrem

(sidejo de ET) s-o Hurler gvidas kurson por 16 geknaboj. Kurso por plenkreskuloj komenciĝis lastan mardon.

Jam pli ol 25 000

germ. markojn ŝuldas al ni la vendistoj de unuopaj ekzempleroj de ET. Estas tutekompreneble, ke juna entrepreno kiel la nia ne povos suferi la daŭran kreskon de tiu sumo. Tial ni insiste petas la aranĝintojn de la poekzemplera vendado, pagi nin almenaŭ ĉiumonate. Alie ni estos devigataj, postuli de ĉiu vendejo antaŭpagon de certa sumo por starigi konton, respektive tute rezigni je la poekzemplera vendado en tiuj lokoj, kie oni estas prokrastema ĉe la pagado.

Parolejo.

113. Respondo al s-o Amort (ET n-o 69). (Rilatas al 110.)

Por kritiki iun ajn Esp. institucion, oni devas unue subteni ĝin. UEA postulas sufiĉe alian kondiĉon. Kio do koncernas la C. O., la situacio estas unuflanka. La Esperantistoj bone scias, ke ĝi estas la centro de la plenumo de laboroj de la L. K. kaj de la Akademio, eldonas ĝiajn cirkulerojn, raportojn, la Oficialan Gazeton ktp., — laboro, kies gravecon neniu povas nei. Alia tasko estas la propagando apud la internaciaj institucioj. La sukcesoj de Esperanto en la Kongreso de la Internaciaj Asocioj en Bruselaj kaj la Esp. paroladoj en la Internacia Universitato estas ĝia laboro. En la klopodol ĉe la Societo de Nacioj, la C. O. ludus rolon, kiun eble nemultaj konas.

Kiu do elportas ĉiujn elspezojn de la C. O.? Neniu klopoda estas fiksa por la Esperantistoj. Preskaŭ sola, dum multaj jaroj (krom la donadoj de kelkaj malavarej amikoj) generalo Sebert, malgraŭ siaj 85 jaroj kaj multaj scienc-aj okupoj, sindoneme subtenas la C. O. Pri pensu, kio okazos, se la cirkonstancoj ŝanĝiĝos! Post 85 jaroj de ekzistado de Esperanto ne estas eble, ke la zorgo pri unu el la oficialaj institucioj estu sur la ŝultroj de unu homo. Anstataŭ, ol senkaŭze kritiki, oni devas sin demandi: Kion ni faris por la C. O.? Estus dezirinde, ke multaj samideanoj legu atente la alvokon de s-ano Waniŝchek el Bratislava kaj, laŭeble, respondu al lia alvoko. Ne helpante, oni ne rajtas kritiki.

(Alo. Paris, membro de UEA de 1915.)

Diversaĵoj.

La problemoj de la surstrata movado en Parizo.

Parizo estas, sendube, la eŭropa ĉefurbo havanta la plej intensan motorveturilan movadon. Sufiĉas pro tio esti sur grandaj bulvaroj je la momento, kiam policano per sia blanka bastoneto haligas la veturilojn por pasigi la piedirantojn: post unu minuto kolektiĝas granda vosto de keldek diversspecaj veturiloj, de la novaj sesradaj aŭtobusoj ĝis la sidbicikloj (side-car). Granda nombro da policanoj observas la surstratan movadon kaj, laŭ lastara alvoko en komerca revuo „Les Echos de l'Exportation“, nur en la Avenue des Champs Elysées (granda promenejo simila al Kurfürstendamm en Berlino aŭ al Prater en Vieno) ĉiutage 75 policaĵoj, dividitaj je tri grupoj, deoras por la movado.

Malgraŭ tio, la statistiko de akcidentoj estas granda. En 1920 estas en Parizo ĉirkaŭ 15000 personoj vunditaj kaj 120 mortigitaj. La statistiko ne donas la mortojn pro vundoj. La aŭtomobiloj kaŭzis 73 mortojn kaj 8894 vunditojn, la ĉevalveturiloj 20 mortojn kaj 2209 vunditojn, la aŭtobusoj 10 mortojn kaj 553 vunditojn.

Inter la rimedoj por gvidi la piedirantojn, la urba konsilantaro elektis, laŭ la modelo de nord-amerikaj urboj, ruĝajn strekojn sur asfalto aŭ ŝtonoj en lokoj, kie la veturiloj devas malrapidiĝi. Sed la unuaj provoj ĵus faritaj (la instalado de ruĝaj spacoj daŭras) ne estas tre kuraĝigaj, kaj okazis eĉ antaŭ du semajnoj akcidento kun mortigo de piediranto, kio pravas, ke la edukado de piedirantoj kaj veturantoj estas ankoraŭ necesa.

Tamen ĉi tiu problemoj antaŭenigas alian. En ĉiutaga „L'Ere Nouvelle“ de 2. oktobro 1921, oni atentis, ke ĉi tiu artikolo estas verkita jam antaŭ kelkaj monatoj kaj nur prokrastita pro manko de loko.

Gazetaro.

En usonaj gazetoj.

Litovlingvaj ĵurnaloj „Darbininkas“ kaj „Vytis“ lastatempe aperigis longajn artikolojn kunligitajn kun Esperanto. En pollingva gazeto „Gwiazda Polarna“ n-o 1 (1922) aperis artikolo dediĉita al la memoro de Antoni Grabowski. La litovlingva gazeto „Amerikos Lietuviai“ (adreso: 15 Millbury st., Worcester, Mass.) eldonis belan kalendaron por la jaro 1922; ĝi enhavas portretojn de d-ro Zamenhof kaj artikolon pri Esperanto.

Ĉeĥoslovakio.

De la 10. dec. ĝis 10. jan. raportis pri Esperanto inter aliaj sekvantaj ĉsl. gazetoj: Nar. Politika, Nar. Listy, Nachod. Listy, Lid, Nova Doba, Vyškov, Nov., Tribuna, Mor.-Sl. Denik, Hlas Lidu, Svoboda, Duch Casu, Vestnik ĉs. profesoru kaj Stredni skola. Kelkaj el ili aperigis plurajn artikolojn.

En Budapeŝtaj gazetoj.

A Nap (20. 1. kaj 22. 1.), Szozat (20. 1.), Pesil Naplo (15. 1.), Az Uisag (26. 1.), Pester Lloyd (26. 1.), kaj Magyarasag (26. 1.) enhavis artikolojn pri Esp. aŭ per Esp. ricevintajn, grandparte tradukojn el ET, ekz. pri la afisekspozicio en Tokio, la fotografarta ekspozicio en Antwerpen, la brazila centarista ekspozicio, la Esp. instruista konferenco en Genève ktp.

Alilanda Gazetaro.

P. T. T. (Organo de poŝtistoj), Paris, 10. jan. (Esp. Inter poŝtistoj de Rusujo.) La Courrier Médical, Paris, 20. 11. (Art. pri TEKA.) El Liberal, Sevilla, Hisp., 25. 1. (Art. „Los esperantistas“, pri kunveno por restarigo de Federacio Esperantista Andaluza.) Twenthe Hengeloeche Courant, Hengelo, Nederl., 28. 1. (Artikolo laŭ ET pri vizito ĉe la elirovinto Schoop.) Nieuwe Hengeloeche Courant, Hengelo, 28. 1. (Informas pri vendado de ET en Hagaj kioskoj.) Lecture du Foyer, Zürich, Svis., 28. 1. (Artikolo „Une langue internationale“ de Marc Ponsot.) Le Droit du Peuple, Lausanne, Svis., 2. febr. (Noto) La Jeune Europe, Paris, 26. j. n. organo de pacifista junularo. (Art. pri Esp. de s-o Peit.) Le Moniteur de l'Oise, Beauvais, Franc., 31. 1. (Artikolo) Le Journal, Verviers, 19. 1. (Artikolo) Workers' Dreadnought, London, 4. febr. (Kurso de Esp.)


Recenzejo.

LIBROJ.

ESENCO KAJ ESTONTECO de la Ideo de Lingvo Internacia. En bulgara lingvo. Tradukita el la originalo de Iv. H. Krastanoff — Bulgara Esp. Biblioteko n-o 7-8. Havebla ĉe Georgi Hr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofio. 12 1/2 : 19 cm. 48 pĝ. kaj kovrilo. Prezo 4 gm. kaj afranko. UNUJAJ PAŜOJ. Facila libro por lerneja legado. Kunmetis kelkaj aranĝis Alexandra Mexin. Eldonita de E. D. I. P., Genève, Svis., Passage Teraillet 18. 23 : 15 cm. 144 pĝ. broŝ. Prezo ne montrita.

ENTWICKLUNGSGANG DER WELTSPRACHE.

Von Dr. Albert Steche, Leipzig 1922. Verlagsbuchhandlung E. G. Weimann. 24 pĝ. 18 : 25 1/2 cm. Prezo: 5 mk. ekakuzive sendkostoj, por alivalutaj landoj 10 mk. ekakuzive sendkostoj. Nia tre ŝata kaj fervorega propagandisto, la prezidanto de la Germana Esperanto Asocio D-ro Steche, estas la verkinto de ĉi tiu en germana lingvo skribita broŝuro, kiu laŭ la opinio de ĉiuj kompetentuloj estas tre valora kaj signifa por la Esperantistaro. Jam la titolo: La evoluo de la mondlingvo montras, ke tiu broŝuro forigas mankon en la Esperanta literaturo. Kompendio, kiu koncize, klare kaj objekte priakribas la evoluon kaj realigon de la mondlingva ideo per Esperanto, estas valoro ne nur por instruantoj kaj novaj Esperantistoj, sed precipe por propagandaj celoj kaj la ĝenerala klarigo de ĉiuj, kiuj interesigas je Esperanto.



Al „Bildoj pri Helsinko“: Kovrita interna korto de la Borso-restoracio kaj klubdomo. Konstruita de Lars Sonck.

d-ro Toulouse, ĉefkuracisto de la frenezulejo de Villeluis, postulas, ke, krom la teknikaj, psikaj ekzamenoj estu farataj al ĉiuj veturilkonduktistoj, kies emociemo aŭ subita malsano estas ofte la kaŭzo de akcidento. Jam dum la milto ĉiuj aviadistoj estis submetataj al psiko-fiziologia ekzameno. Por klarigi la gravecon, li citas fakon de kuracista de li aŭtomobila kondukisto kun epileptaj krizoj. Same, komisio de la ministro de publikaj laboroj, ekzameni fervojajn oficistojn, li trovis emocie malsanajn personojn.

La problemoj de la surstrata movado estas do same grava kiel tiu de la fervojoj nun tiel akcidentemaj. Alo.

Artifikoj de kontrabandistoj je opio.

Ne ekzistas pli lertaj kontrabandistoj ol la ĥinaj kontrabandistoj je opio. Kelkajn el iliaj artifikoj rakontas angla vojaĝanto, kiu observis la esploradon de alvenintoj en la haveno de Shanghai per la doganestroj:

Pasaĝera vaporsipo el Hindujo ĵus alvenis, kaj sub la bruado de l' „kuli“ (ĥinaj portistoj) kaj la krakado de la leviloj la miksitaj amaso de l' orientaj vojaĝantoj sin ŝovas trans la albordigan ponton. Doganoficisto komencas rapide kaj singarde sian esploradon. La tutan korpon de ĉiu pasanta pasaĝero li palpas de kapo ĝis piedoj. Nun aliretas maljuna virino, ŝanceliĝante kiel anasino sur siaj kunligitaj piedoj. Sub la brako ŝi portas korbeton. „Kio troviĝas en la korbetoj?“ demandas la oficisto. La nigraj okuloj de la ĥina maljunulino palpebrumas tute nesuspektige el la sulkiĝinta, flava vizaĝo, kaj en stranga angla-ĥina jargono ŝi klarigas, ke ŝi havas katinon kun ĉarmaj idetoj, kiuj bedaŭrinde ĉiuj mortis sur la sipo. Kaj levante la kovrilon de l' korbetoj, ŝi montras nigran katinon, kies flavaj okuloj malice brilas, kaj ĉirkaŭ ŝi la kadavrojn de ses nigraj katoj. „Kion do vi volas fari kun la kadavroj

Tian informilon ni jam de longe serĉis, kaj sendube neniu estis pli kompetenta rilate al la elaborado de ĝi ol D-ro Steche, kiu konate la tutan terglobon kaj volaĝinte sur ĉiuj maroj ĝisfunde studadis lingvojn, popolojn kaj spertis la neceson de lingva interkompreniĝilo. Spertoj konvinkas, klara ekono de bezono estigas ĉiun batalanto por la ideo mondlingva. La kvin ĉapitroj de l' kompendio pri-traktas: Evoluo de la ideo mondlingva, Esperanto, Disvastiĝo de Esperanto, Esperanto en la mondmilito kaj Esperanto post la mondmilito. Kronologie ordigita tabelo de la ĉiuj okazintaĵoj (1878—1922) finas la broŝuron, la instrulilon kaj propagandilon de unua rango. Mi bedaŭras, ke nur personoj komprenantaj la germanan lingvon povas ĝi kaj uzi ĝin, ĉar pro sia relative malalta prezo ĝi estas tre konvena por la tiumoda samideanaro kaj inteligentularo. — Dankon al nia senlaca pioniro por lia laboro. Lia verketo certe kunhelpos la pluan disvastiĝon de Esperanto precipe en Germanlando. Ke ĉiuj aĉetu kaj propagandacele utiligu ĝin, estas honora deo de la germanlingvaj samideanoj. (G. Ajul.)

FOGRAFAJO de s-ino Klara Zamenhof kun ges-oj Applebaum kaj s-o Bernmann.

Bone sukcesinta Foto (formato 11 : 14 cm), farita dum la XIII-a en Praha. Prezo 20 gm. por bonvalutaj landoj 60 gm. Havebla ĉe Maks Walther, Uelzen in Hannover, Germ. Lüneburger Landstr. 18.

PRI CERVANTES kaj lia famkonata verko „El Quijote“. Eldonita de Madrida Esperantista Grupo. 40 pĝ. 11 1/2 : 18 cm. Madrid 1915. Prezo: 1 pes. (4 resp. kup.). Senpage por abonantoj de „Hispana Esperantisto“. Niaj madridaj samideanoj honoris la aŭtoron de l' „Don Quijote“ (elparolu: Kihote) per la eldono de broŝuro enhavanta lian kompletan biografion, kiun s-o Kühnl tradukis el la ĉeĥa lingvo, kaj artikolojn pri la eminenta poeto kaj lia verko de Ingheda, Cadornil, Barriobero y Herrán, Redondo, Josep Graŭ Casas, Julio Manzada Rosenbrn, San Nulán kaj Josè Rodó. — La bonstilleco de la artikolo estas laŭdinda. Mi ne dubas, ke ĉiuj, kiuj deziras havigi al si bonegan biografion pri Don Miguel de Cervantes Saavedra, volonte legos la libron bone presitan. (G. Ajul.)

GAZETOJ.

Arguso, Jan. Nederland-Esperanto. Kvin decembraĵoj numeroj. Belgia Esperantisto. Nov.-dec. Adreso: Frans Schoofs, Kl. Beerstraat 45, Antwerpen. Inter aliaj interesa artikolo pri „La demando pri la plibonigo de la Muzikskribo kaj ĝia solvo per la Aŭtonoma Muziknotado“. Ruĝa Esperantisto. Dec. Adreso: Niŝnij-Novgorod, 9, Mirnosickaja, Rus. Esperantista. Jan. Suislan Idisto. Febr.

PROSPEKTOJ, FLUGFOLIOJ ktp.

WIESBADEN Internacia Banurbo. 6paĝa prospekto (formato 14 : 22 cm) presita sur luksa papero, kun ses ilustraĵoj. Havebla ĉe Sildisches Verkehrsamt (Urba Oficejo por Trafiko) en Wiesbaden, Germ. PRINTEMPO-FOIRO de Frankfurto a. M., 2-8. aprilo. 4 pĝ. 16 : 21 cm. Tre plaĉa prospekto dukolora presita. REGULAMENTO de Esp. Rondeta „Verda Stelo“ en Sao Bonifacio, Estado de Santa Catharina, Brazilio.

Tre utilaj Propagandiloj

precipe por Esperantistoj de franclingvaj landoj.

Jus aperis:

Prof. Aymonier. La dérivation comparée dans les langues naturelles et artificielles — grava lingva komparo de Esperanto kaj ido

Léon Agourline. L'Esperanto et la lutte des langues (artikolo aperinta en „La Revue Contemporaine“, nov. 1921) — tre aktuala

L'Esperanto et les Associations Internationales — stenografra raportoj pri la kongreso de Internaciaj Asocioj en Bruxelles en 1920

Antaŭmilitaj kaj dumilitaj verkoj de Prof. Aymonier:

Une langue vivante artificielle — komentarioj de Esperanto kun ekzemploj

Réponse à des critiques (artikolo en „La Revue du Mois“) — pri ido

Autour de l'Esperanto — lingva defendo kontraŭ reformoj

Pri Esperanto — la sama verko, tradukita Esperante de s-o Ferter

L'Histoire d'une Délégation — la vero pri la Deleĝitaro kun dokumentoj

Conférence contradictoire à la Bourse du Travail en 1912

Lazaro-Ludoviko Zamenhof — biografio, franca kaj Esperanta

Rektoro Boirac. Le Congrès de Genève (el „La Revue Pédagogique“)

Prezo en frankoj:		
	Le problème de langue internationale (el la sama revuo)	0.40
5.—	Prof. Bourlet. Conférence faite aux élèves de l'Ecole Supérieure de la Marine — propaganda parolado en la Supera Mara Lernejo	0.75
0.50	Barton Kent. Une langue commerciale commune — parolado en Londona Komerca Cambro, traduko de Grosjean-Maupin kaj Sayer	0.60
2.—	Kontrakto de la Ligo de Nacioj — france, angle, Esperante	3.—
	D ro Cuisnier. De l'Esperanto — argumentplena propagandilo	0.40
	G. Chavet. Pourquoi les postiers doivent apprendre l'Esperanto — por poŝtistoj	0.60
2.25	Baronno de Ménil. La monduma virino kaj la infano de popolo — france kaj Esperante, luksa eldono kun ilustraĵoj	1.—
0.50	Generalo Sebert. La langue auxiliaire internationale	0.40
1.—	Barono de Ménil. Les préjugés contre l'Esperanto — tre trafa	1.—
1.—	Muffang, Prof. Langue Internationale. Point de vue national	0.50
1.—	Kapitano Bayol. L'Esperanto et la Croix-Rouge, kun milita vortaro	2.—
1.—	2. Congrès Universel de l'Esperanto — artikoloj de la franca gazeto	0.25
0.50	3. Congrès Universel de l'Esperanto — artikoloj el la angla gazeto	0.50
0.60	L'Echec de la Délégation — du kajeroj de nekonataj oficialaj protestoj kontraŭ la Deleĝitaro, tre gravaj dokumentoj	2.80

Bonvolu aldoni al la antaŭpagata mendo 10% por sendelspezoj kaj sendi ĉiujn mendojn al:

ESPERANTISTA CENTRA OFICEJO, 51, RUE DE CLICHY, PARIS 9.

Registrita



Fabriksigno

N-o 242161

ERNST VANOLI

FREIBURG I. Br., Germ., Starkenstr. 19.
Fabrikado de novspecaj ludiloj.

Eksporto ĉiulanden. — Kapablaj reprezentantoj dezirataj.

Progresemaĵ Edukistoj

kaj interesataj samidealaj needukistoj!
Luktu kontraŭ instruado pri malamo kaj militemo!
Helpu starigi „Unuforman Universalan Lernejon!“
Aliĝu al

Edukistara Internacio,

kiu havas grupojn en la tuta mondo, zorgas pri ĉiuj internaciaj edukaj dokumentoj (interŝanĝo de infanoj), uzas Esperanton.

Sin turni al:

Marcel Boubou, 96, rue St. Marceau, Orléans, Franclando.

Ĉarmaj okulfrapaj propagandiloj! Afiŝetoj el Aluminio

en verda koloro sur blanka fundo.

Por najli sur la pordon de via magazeno, oficejo, loĝejo (okulfrapaj en okulalico super la ansoj) Provizaj tekstoj (aliaj en preparo):

„Esperanto parolata“
„Membro de Universala Esperanto Asocio (UEA).“
„Membro de Germana Esperanto Asocio (GEA).“

Prezoj (en germ. marko), afrankite:

1. Germ. Aŭst. Luksemb., Okcident. Pol., Danzig, Memel, Saar:	10	50	100 pecoj
	2 60	2 40	2 30 po peco
2. Baltiko, Bulg., Ĉeh., Finn., Hung., Polujo, Ruman., Rus., sudslav. ŝtatoj kaj Turk. 20% a plialtiĝo.			
3. Ĉiuj aliaj landoj 50% a plialtiĝo.			



Esperanto parolata!

Sola reprezentado por kelkaj landoj ankoraŭ havebla.

Korespondado eksterlanden nur en Esperanto.
Fritz Mayerhauser, Bad Reichenhall, Germanujo.

Muthschall & K-io

liveras

Teksaĵojn

je plej favoraj prezoj. Petu specimenojn kontraŭ respond-kupono.

Adr.: Forst I. L. (Germ.), Gubenerstr. 28.

Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg.
Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beersstraat, Antwerpen.
Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Kralové. Otto Lumpe, Trautenau.
Estonia: Est. Esp. Unuiĝo, postkast 6, Tallinn.
Finna: O.Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.
Hispana: Konrado Doménech, Ceron, Rambla Alvarez 12-2.
Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-urca 15 II-2, Budapeŝt VI.
Japana: Morizo Ga. 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.
Litova: Paŭlo v. Medem, Smeliiu g-ve 12, Kaunas (Kovno).
Pola: Adolfo Oberleitman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 3125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
Rumana: Esperanto-Oficejo Ĉiuj.
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1, U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 800 Fifth Avenue, New York City.

La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof kaj la funebra ceremonio.

Valora memorajo por ĉiu Esperantisto.

Presita sur luksa papero.

Kun 11 ilustraĵoj laŭ originalaj fotografaĵoj.

(Funebra procesio sur strato Teatrlna. — Sur la Tombejo. — Enterigo de la ĉerko. — Paroladoj de la predikanto d-ro Poznanski, de s-ano Grabowski kaj de majoro Neubarth. — La tombo, novaj fotoj de aprilo 1921.)

Prezo 18 germ. mk. inkluzive sendkosto.
Eldonejo de „Esperanto Triumfonta“, Köln-Horrem.

Art-Amikoj,

Artajo-, Bildo- kaj Libro-Vendistoj,

kiuj havas intereseon por belegaj akvareloj, oleopentraĵoj ktp. de eminentaj kaj konataj pentristoj aŭstria, turnu sin al **Sepp Osterer, Graz, Aŭstrio, Gleisdorfegasse 5.** Favora okazo por eksterlandanoj pro la malalta valuto aŭstria.

Internacia Foiro en Praha

IV-a Foiro: 12.—19. Marto 1922

V-a Foiro: 3.—10. Sept. 1922

Bonvolu adresi infompejojn al la konsuloj de la Ĉeĥoslovaka Respubliko, la oficialaj reprezentantoj de la foiro kaj al

Foira Oficejo, Praha I

Staromestská radnice.

Telefonnumeroj: 7434 kaj 9140. — Kabladreso: Foirofoicejo Praha.

Eksporto. Eksporto.

Kiel specialaĵoj estas ofertataj je fabrikprezoj:

Aluminiaj Kuirilaroj
Emailaĵoj
Zinkumitaj Kuirilaroj
Staloj, Poŝtranciloj, Manĝilaroj
Raziloj, Razaparatoj
Ilaroj kaj ĉiuspecaj
Agrikulturaj Instrumentoj
Mane forĝitaj Cenoj
Fajrujoj por Gaso kaj Karbo.
Plej bonaj kvalitoj.

Prezoj kaj reproduktaj estas disponeblaj.

Eksporto al ĉiuj landoj.

Kapablaj reprezentantoj serĉataj.

Josef Schweizer, Freiburg I. Br.
Unterlinden (Germanio.)

Nederlanda Esperanta Komerc-Oficejo

(Nederlandsch Esperanto-Handelsbureau)
Diergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)

Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin ŝarĝas per la disendo de cirkuleroj.

Prokuras komercajn adresojn.

Prizorgas la anoncadon en Nederlando.

Interrilatiĝas kun nederlandaj komercistoj kaj industristoj.

Sciigas la kurzojn de valutoj kaj valorpaperoj.

Anoncetoj.

ADIAŬION plej elĝoran al ĉiuj sinceraj verdulinetoj, verdulinoj kaj verdulinoj de Bydgoszcz. Mia nova adreso por geskribemuloj: Edm. Feihke, Horrem-Köln, Schulstr. 3, Germanio.

ŜANĜO DE ADRESO. De la monato februaro mia nova adreso estas: Stetano Pedrazzini, de Missas Pedrazzini and Company, Arispe (Senora, Mxico).

OFICO SERĈATA. 22-jara estona fraŭlino petegas tute egale klan oficon. Scipovas germanan, rusan, estonan kaj Esperantan lingvojn. Adreso: Estonio, Tallinn, Malmi 18 n 3 k. 7, Rita Perk.

LABORON en bonvaluta lando kiel privatinstruisto, en oficejo ktp. serĉas STUDENTON. Leticio en stenografio, skribmaŝino, forteplano. Sicora, Halle a. S., Germ., Kassestr. 2.

REDAKCIJO DE ESPERANTA GAZETOJ, verkistoj de Esp. libroj kaj propagandiloj estas petataj sendi stajn publikitaĵojn al redakcio de „Esperantistoj Zpravodaj“, Praha II, — 2032. Ĉeĥoslovakio (ĉeĥa poresperanta Informilo), kiu rekomendos iin al sia legataro. Laŭplaĉe interŝanĝo de la gazeto! Sen paga publikigo de adresoj!

Korespondo kaj Interŝanĝo.

J. Nagamura, Imperia Universitato, Fukuoka, Japanujo, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (pm. bfl.), leterojn kaj gazetojn.

Herman Honovalov, Teatrlnaja pl., 6, 9, Nijni-Novgorod, Rusio, deziras korespondi per leteroj kun universitataj studentoj, per poŝtkartoj ilustr. (bfl.), nur vidaĵoj de teatroj; interŝanĝas gazetojn.

S-o Alfred Sover, Tartu, Estonio, deziras korespondi kun lertaj gesamideanoj pri amo kaj amuzaj aferoj. — Interŝanĝas ilustr. poŝtkartojn kun ĉiuj landoj.

F-ino Mariia Lukoŝevičaite, Dotnava, Z. U. mokykla, Litovio, interŝanĝas poŝtkartojn ilustr. kun ĉiuj landoj.

S-o Malewski sendas por 60 gmk 36 dentumitajn kaj 31 nedentumitajn poŝtmarkojn de Meza Litovio. Por 40 malsamaj poŝtmarkoj mi sendas 30. — Vilno, Wilenska 27-7, Meza Litovio.

Wl. Reszka, gimn. Instr., Choiniec, Pol. Placo Król. Jadwigi 2, deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri sporto.

F-ino Nevenka Tinterova, str. Car Boris 176, Sofia, Bulg., deziras interŝanĝi poŝtmarkojn uzitajn laŭ katalogo de Michel 1921/1922.

S-o Hristo Dubarov, bul. Evlogi Georgiev 96 b., Sofia, Bulg., deziras korespondi kun ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj.

S-o Hristo P. Kacarov, str. Regentska 74, Sofia, Bulg., deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

S-o Konstantin Dimitrov, str. Car Boris 69, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj, interŝanĝas Esp. gazetojn, papermonon kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o Koljo Benev, Belosem, Trojan, Bulgario, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj kun la tuta mondo.

Fr. Giza Mark, Timiŝoara I, Jenő Herceg 6, Rumanio, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn (bfl.) kun gesamideanoj en la tuta mondo.

Emanuelo Berger, Timiŝoara III, Csaky u. 1, Rumanio, deziras korespondi pri diversaj temoj, precipe pri komercaj rilatoj, kun la tuta mondo.

Karlo Luftschtitz, Timiŝoara IV, Linke Bega Zeile 26a, Rumanio, deziras korespondi pri diversaj temoj, precipe pri komercaj rilatoj, kun la tuta mondo.

F-ino Stanisława Lisnerowa, Lodz, Pollando, ul. Gdanska 144, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kun ĉiuj landoj.

F-ino Helmi Erop, Bydgoszcz, Pol., ul. Siemiradzkiego 10, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj.

S-o Kazimierz Miedunlecki, Bydgoszcz, Pol., ul. Sw. Troicy 18, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, kun ĉiuj landoj.

S-o Kazimierz Domosławski, kunlaboranto de soc. gazetoj, Warszawa I, poste restante, serĉas ĉiulandajn seriozajn korespondantojn pri laborista, socialista movado kaj ĝenerale pri politika vivo en ĉiuj landoj. Interŝanĝas sendos samajn informojn el Polio.

F-ino E. Pliškedičaitė, Siauliai, Mazoj Posadna 4, Litovio, deziras korespondi kun gesamideanoj de ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kaj papermonon.

S-o Walter L. F. v. d. Have, Krabbenbosweg 155, Hengelo (O), Nederlando, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj kun la tuta mondo, precipe kun fraŭlinoj; interŝanĝas ankaŭ gazetojn, Esperantaĵojn kaj poŝtmarkojn.

S-o Jose Ventura, 12, Roterodamo, Valencia, Hispanio, gvidanto de kurso Universitata, deziras ricevi po unu ĉiuspeca Esperantaĵo kaj korespondpejojn por alaj ĝenerantoj. Li dankos poŝtkarte.

S-o Josef Vogel, Salzburg, Aŭstrio, Wolfriedrichstr. 7, deziras korespondi per leteroj, poŝtkartoj ilustr. (bfl.) kun ĉiuj landoj.

S-o Max Hubl, Salzburg, Aŭstrio, Averspergstr. 54, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kun ĉiulandanoj.

S-o Willy Weillepp, iuna instruisto, Merseburg a. S., Haackestr. 2, Germanio, deziras korespondi kun ĉiuj landoj, precipe kun fraŭlinoj. Interŝanĝas ankaŭ pm.

S-o Osw. Wittig, komercisto, Merseburg a. S., Germ., Klausenstr. 3, deziras korespondi per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj kun ĉiulandanoj, precipe fraŭlinoj.

La gimnazio Esp. grupo Oppeln, Supra Silezio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj nur kun aliingvanoj. Bonvolu adresi al la prezidanto Jozefo Kothe, Oppeln, Karlsr. 22.

Por ĵus finigataj du kursoj estas serĉataj gekorespondantoj por 40 kursoj por povl interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (bfl.), leterojn kaj poŝtmarkojn. Adreso: Walter Zinke, Chemnitz-Rottluff, 12 B, Germanujo.

S-o E. Friebe, instruisto, del. de UEA, Residenzstr. 24, Dresden-Dobriř Germanlando, serĉas tutmondajn gekorespondemulojn per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj pri ĉiu temo, prefere pedagogia; donas komercajn informojn.

35 fervore lernantaj geknaboj (11-15 l.) serĉas samagajn gekorespondemulojn. Ilustr. poŝtkartojn al instr. Friebe, popola lernejo Dresden-Dobriř, Germanland.